

Eŭropa Bulteno

Februaro 2018, Numero 178

RAPORTO PRI LA AGADO DE EEU EN 2017



Ekstera Agado

La Platformo por multlingveco plu ekzistis en 2017 kaj en ĝi plu estas EEU kaj E@I kun kune 4 membroj, sed ĝi pasiviĝis. Tamen iom revigliĝis la ĉefoj de la Platformo kaj invitis la membrojn de la Platformo partopreni en februaro 2018 en konferenco pri multlingvismo kunvokita de al Ĝenerala Direktorejo de Edukado kaj Kulturo de la Eŭropa Komisiono. EEU partoprenos.

En 2017 EEU zorgis pri efektivigo de nova projekto kadre de Civitaneco por Eŭropo financata de EU „Rakontoj el rememoro: Rememoroj pri elmigrintoj pro milito en Eksjugoslavio cele al konstruado de paca kaj tolerema mondo”. Ĝi ekrealiĝis en septembro 2016 kaj estas daŭrigata en 2017 ĝis septembro. EEU estas kunordiga organizo kaj partneroj estas Asocio por Eŭropa Konscio el Maribor, E@I el Partizanske kaj Aŭstria instituto por Infanfilozofio el Graz. La preparojn por la realigo de la agadoj faris ĉiuj partneroj kaj nome de EEU nia direktorino Maja Tišljar. Ĝi portos al EEU 25.000 eŭrojn kies parton ni uzos por la planitaj laboroj, sed antaŭvideble ĉirkau 5000 eŭroj restos por la aktivadoj de EEU ĝenerale. Tio obligis ke EEU ankaŭ en 2017 esti finance pozitiva. EEU devis realigi kaj faris tion tre

sukcese aranĝon en kiu ĉiuj partneroj resumis kaj taksis la laboron planitan. Tiu kunveno okazis en germana urbo Freiburg la 3-an de junio 2017 kun partopreno de trideko da personoj el EEU kaj aliaj partneroj. En la sama jaro ankaŭ aliaj partneroj realigis siajn taskojn kadre de la projekto: Asocio por eŭropa konscio el Maribor realigis foto-ekspozicion pri elmigrintoj pro la milito en Eksjugoslavio. Tiu ekspozicio migris al Partizanske kie oni ankaŭ organizis prezenron de libro verkita originale en Esperanto (Z. Tišljar: Eŭropa ideologio) en la slovaka traduko.

La portalo de la projekto lingvo.info kiun ni finis en 2015 daŭre funkcias kaj multaj homoj informiĝas pri lingvoj en ĝi. Ĝi estas atingebla ĉe <http://lingvo.info/eo/>

Okaze de la Eŭropa Tago de la Lingvoj EEU dissendis inviton al la landaj asocioj prifesti ĝin kaj publikigi la aktivecojn. Ne multaj vere faris ion, tamen, ni ricevis dekon da informoj pri diversaj manifestadoj al tiu Tago dediĉitaj.

Maja kaj Zlatko Tišljar kun helpo de Maja Cimerman ellaboris komence de la jaro 9 projektojn por financado far EU ĉe Eŭropo por Civitanoj. El ili bedaŭrinde neniu sukcesis en kiu EEU estas partnero, sed sukcesis alia gravega projekto kadre de Erasmus+ kiun gvidas eldonentreveno Izvori el Zagrebo kaj kiu celas produkti didaktikajn materialojn por lernobjekto Multlingva Akcelilo, kiu ebligas ke oni enkonduku tiun lernobjekton (kiu fakte estas 64-hora lernado de mini-esperanto) por 3-a-klasanoj en bazaj lernejoj), kiujn povos gvidi baze de la instrukciaro kaj la evouinta didaktika materialo lingvoinstruistoj en la lernejoj kiuj ne estas esperantistoj. La projekton realigos Izvori kum 8 aliaj partneroj el 6 landoj. Inter ili estas du universitatoj (Suddana, kaj Maribora) kaj tri bazaj lernejoj el Kroatio, Slovenio kaj Bulgario). Krome Studio Gaus el Berlino, Inter-kulturio el Maribor kaj E@I el Partizanske. Aŭtoro de la baza plano estas Zlatko Tišljar kaj la konkretaj verkintoj de la projektpropono estis Maja Tišljar kaj Maja Cimerman.

La membroj de la estraro, sed ankaŭ aliaj aktivuloj kaj asembleaj membroj partoprenis en kelkaj neesperantistaj politikaj, sciencaj kaj interesorganizaj konferencoj kaj kunsidoj diverstipaj.

Aparte elstaris la laboro de Jozef Reinart kaj Petro Baláž en Slovakio, kiuj estis inter organizantoj de 400-persona monda konferenco de poliglotoj en Bratislavo komence de majo. Inter la konferencanoj 30% estis poliglotoj kiuj scias ankaŭ E-on. Ili havis plurajn renkontiĝojn kun politikistoj en Slovakio. Grandegan aktivadon faris la prezidanto Seán Ó Riain havante la taskon kontakti Komisionanon de EU-Komisiono Vytenis Andriukaitis. Seán sukcesis konvinki V. Andriukaitis akcepti esti ĉefparolanto en la konferenco de EEU dediĉita al 100-jariĝo de la morto de Zamenhof sub la titolo: Zamenhof kiel antaŭulo de homaj rajtoj. Poste li aranĝis plian kunvenon kun Andriukaitis en Bruselo kie la delegacio de EEU (estrarano Ulrich Brandenburg kaj Vic-Prezidantino de EEU Flory Witdoeck) gvidata se Seán transonis al Andriukaitis diplomon kaj medalon kiel honora membro de EEU. Dum tiu kunveno la komisionano akceptis inviton de UEA esti ĉefparolanto dum la UK en Portugalio 2018. Seán parolis dum la konferenco en Freiburg pri Zamenhof kaj la 2an de decembro 2017 en Pola instituto en Vieno pri la sama temo. Li kun Jozef kaj en aŭtuno kun Ulrich Brandenburg evoluigis nian pluan strategion koncerne la rilatojn kun Eŭropa Komisiono. Ili intencas inviti Komisionanon Navracsics malfermi EEU-kongreson en Hungario en 2019.



Zamenhof.

La nova estraro de EEU (Seán Ó Riain, Zlatko Tišljár, Ulrich Brandenburg, Jozef Reivart kaj Flory Witdoeck) havis apartan kunvenon kun eŭropa komisionano Vytenis Andriukaitis pri eblecoj kiujn li povus subteni cele al antaŭenigo de Esperanto. La kunsido okazis posttagmeze la 3-an de junio en la konferencejo en Freiburg. Detale pri tiu kunsido legu artikolon en EB julio/aŭgusto. Andriukaitis aperigis en sia blogo kadre de tiu de Eŭropa Komisiono la tutan paroladon en Freiburg pri

La konferenco de EEU kiel enkonduko al la germana E-kongreso okazis antaŭtagmeze la 3-an de junio en Freiburg. Enkondukis ĝin dro Vytenis Andriukaitis kaj referis pri la temo Ulrich Brandenburg, Jozef Reivart, Seán Ó Riain kaj Zlatko Tišljár. Iliaj kompletaj referaĵoj legeblas en EB de junio/aŭgusto kaj de septembro 2017. En la konferenco partoprenis ĉirkaŭ 150 konferencanoj, ĉefe membroj de Germana E-kongreso. Okazis 2 plenkunsidoj de la Asembleo kaj unu kunsido de la estraro de EEU. Ĉi-jare bedaŭrinde ne okazis Ekonomia Forumo en pola Krynica.

Gravaj atingoj por Esperanto en Eŭropo en kiuj EEU ne rekte partoprenis:

Nova reta kurso learn.esperanto.com stimolata de EEU ne sukcesis realigi ĝis la jarfino de 2017 ke ĝi havu ĉiujn lingvojn de EU, ĝis la fino de la jaro 17. Ĝi tamen kreskis de 13 lingvoj fine de 2016 al 22 lingvoj fine de 2017. Ĝin vizitas tage inter 300 kaj 400 personoj, do dum la tuta jaro 13.000 personoj. La retportalon starigis en majo 2016 berlina esperantisto kaj komputilisto Georg Jaenig kaj plu prizorgas ĝin. Ĝia kvalito estas ke ĝi estas la plej rapida metodo por atingi parolbazon de Esperanto kaj ĝin oni baldaŭ povos uzi en ĉiuj EU-aj lingvoj. Temas pri dekdulecna kurso laŭ la Zagreba Metodo kun interaktivaj ekzercoj. Kaj la portalon uzos en sia prova fazo la EU-projekto Multlingva Akcelilo.



Nun jam tri-jara reta E-kurso kadre de granda portalo duolingo plu kolektas rekordojn. Ĝis la jarfino la anglan version de la kurso komencis uzi pli ol miliono da lernantoj kaj post unu jaro kaj duono ankaŭ la hispana versio kun pli ol 200.000 kursanoj. La kurso estas rekordulo rilate la nombron de homoj kiuj ne nur interesiĝas pri E sed ankaŭ almenaŭ komencas ĝin lerni. Grava parto de tiuj gelernantoj venas ankaŭ el Eŭropo.

Grupo da entuziasmoj el Pollando sub

la gvido de Halina Komar sukcesis organizi E-partoprenon en la plej granda internacia junulara manifestaĵo Woodstock en Pollando. Dum 7 tagoj sur la loko kie kunvenis 300.000 gejunuloj staris du grandaj tendoj kun E-informoj kaj kursoj, kie daŭre deĵoris esperantistoj. Tie eksciis pri Esperanto unuloke la plej eble granda kvanto da homoj, ĉefe gejunuloj.

Grava estis ankaŭ la proklamo far EEU de la jaro 2017 La jaro de Zamenhof okaze de 100-jariĝo de lia morto. Tiun okazon tre bone eluzis ĉiuj esperantistoj en Eŭropo kaj organizis multajn manifestaĵojn; de prelegoj, konferencoj kaj informado en kiu aperis tre multak artikoloj TV-raportaĵoj, radio eldencoj ĉie en Eŭropo. Elstaris laŭ mia supervideblo pri tio Hispanio, Pollando kaj Kroatio. Aliaj landoj ne raportis pri tio al EEU, kio ne signifas ke ankaŭ en aliaj landoj ne multo okazis.

Enmovada Agado

En 2017 la ĉefaj administraj devoj estis organizitaj kadre de la Germana E-kongreso en Freiburg kie okazis du kunsidoj de la asembleo kaj unu kunsido de la estraro de EEU. La 3-an de junio kunsidis la estraro de EEU, kiu traktis kelkajn aktualajn temojn, kiel la estontajn konferencojn de EEU, raporton pri la realigata projekto „Rememoroj pri rifuĝintoj el la Eksjugoslavia milito“, kaj propono por la funkcioj de prezidanto, vicprezidanto kaj sekretario en la estraro elektota la postan tagon. Tiusence en la nova estraro kvinmembra estis proponitaj la samaj personoj en la tri funkcioj kiel ĝis nun: Seán Ó Riain kiel prezidanto, Flory Witdoeck kiel vicprezidantino kaj respondeculino pri financoj kaj Zlatko Tišljar kiel sekretario. Estas aparte starigita la grava tasko por la estraro serĉi tuj personojn por la funkcioj de la respondeculo por financoj kaj de la sekretario en la sekva mandato post tri jaroj, ĉar Zlatko Tišljar kaj Flory Witdoeck pro la aĝo ne plu plenumos tiujn funkciojn.



La 4-an de junio okazis ĉefa asemblea kunsido kun la oficiala raporta tagordo kaj novelektoj de la estraro. Ĉeestis 10 asembleanoj kio sufiĉis ke la asembleo plenrajte decidados, ĉar la kotizojn pagis 19 landoj kaj 10 estis reprezentitaj. Post la raporto pri la agado en 2016, pri la financoj en 2016 kaj revizoro kaj ioma diskuto ĉiuj raporto estis akceptitaj unuvoĉe krom tiu por financoj kun du sindetenoj. Ankaŭ laborplano por 2017 estis akceptita. Estis elektata nova estraro por la 3-jara mandato inter 2017 kaj 2020. Prezintinte la 5 kandidatojn la

prezidanto de EEU voĉdonigis la asembleon kiu unuanime akceptis ĉiujn sen doni pliajn proponojn. En la nova kvinmembra estraro estas tri antaŭaj membroj kaj du novaj. Tiel la estraro nun estas tre kompetenta por plua laboro, aparte je la nivelo de rilatoj kun la organoj de EU. La prezidanto estas d-ro Seán Ó Riain, irlanda diplomato, nun laboranta en Vieno, vicprezidantino estas Flory Witdoeck, entreprenistino el Belgio, la sekretario estas Zlatko Tišljar, emerito el Slovenio/Kroatio. La du novaj membroj estas dr-o Ulrich Brandenburg, longjara ambasadoro de Germanio, nun loĝanta en Berlino kaj Jozef Reinart, tre sperta kaj laborema diplomato el Slovakio. Interese ke eĉ tri membroj sufiĉe proksime loĝas kaj povus se necese urĝe kunveni. Ne daŭrigis siajn estraranecojn, Peter Balaž, Sandra Schweder kaj Nikola Rašić.



Samtage okazis la dua malferma asemblea kunveno kun interesitaj kongresanoj kiu traktis la temon de perspektivoj por Esperanto en EU post Briteliro. Partoprenis pluraj kongresanoj en vigla debato.

La Eŭropa Bulteno regule aperis krom la marta numero tiel ke aperis 9 monataj kaj unu dumonata numero (julio/aŭgusto), ĉiu je 12-18 paĝoj. Ĝin ni publikigis en la paĝaro de

EEU www.europo.eu. Kopie ĝi aperas ankaŭ en la retejo de Remuŝ. Redaktis Zlatko Tiŝljar.

La kunlaboro kun UEA estis bona: Ni interkonsentis ke en k en renkontiĝo kun Andriukaitis en decembro nia delegitaro prezentu proponon de de prezidanto de UEA pri tio ke komisionano V. Andriukaitis estu ĉefparolanto dum la malfermo de la Universala Kongreso en Lisbono. La sekretario kaj la prezidanto aktivis en la listo de Komisiono de UEA por Eŭropo.

La **landa agado** estis kontentiga. Ni invitis la landojn laŭeble bone eluzi la jaron 2017, en kiu UNESCO invitis ĉiujn ŝtatojn membrojn soleni la 100-an jaron de la morto de Zamenhof. Ĉiuj landaj asocioj fakte faris tiusence multon, ĉefe en informa fako. Ŝajnas al mi ke la plej aktivaj tiusence estis Hispanio, Pollando kaj Kroatio. Ankau germanaj esperantistoj kvalite okupighis pri la Zamenhof-jaro. Centra okazajho estis scie3nce simpozio pri Zamenhof en Pola instituto en Berlino de la 21-a ghis la 23-a de aprilo kun kvindeko da partoprenantoj el 5 landoj.

Bona kunlaboro pludaŭris kun Germana E-Asocio, kiu plu administras salajron de nia direktorino Maja Tiŝljar kaj rilate la komunan organizon de la Germana E-kongreso kaj konferenco Eŭropa de EEU dediĉita al Zamenhof.

La estraranoj regule kunlaboris kaj partoprenis en E-aranĝoj de landaj asocioj en siaj landoj: Zlatko Tiŝljar en Slovenio kaj Kroatio, Flory Witdoeckt en Belgio, Peter Baláž en Slovakio kaj Ĉeĥio, Seán Ó Riain en Aŭstrio.

Krome ni realigis preskaŭ ĉiujn punktojn de nia laborplano por 2016. Prizorgadon de la retpaĝaro plenumis Maja Tiŝljar. Ankaŭ la tuta administrado (prizorgo de dokumentaro, ellaboro de novaj projektoj kaj raportoj, prizorgo de financoj, estis plene plenumita, kion prizorgis Maja Tiŝljar, Flory Witdoeckt kaj Zlatko Tiŝljar. La estraro ankaŭ preparis ampleksan laborplanon por 2018-a jaro kiu aperis en la novembra numero de EB.

Financoj

La kotizpagado en 2017 estis kontentiga: Pagis plimulto de la asocioj.

La jaro finance estis, bona, ĉar ni ricevis duan parton de pagoj por nove aprobita projekto far Eŭropa Fondaĵo Civitaneco en Eŭropo. La direktorino daŭre zorgas pri ellaboro de novaj projektoj kaj partopreno en pluraj konkursoj.

Flory Witdoeckt ellaboris la financon raporton por la financaj instancoj de Belgio por 2016 kaj por la asembleo en Freiburg. Ŝi daŭre librotenas la tutan financon laboron. Ni sukcesis pluteni la profesion laboron de Maja Tišljar (kiu ricevas salajron en Germanio, kie ŝi loĝas pro kontrakto inter EEU kaj GEA). Tio tre gravas, ĉar la kondiĉo por ricevi financadon kaj pli grandajn projektojn estas ke la asocio jam havas almenaŭ unu profesiulon kaj la amplekso de laboroj ĉiam pli vastiĝas.

Zlatko Tišljar, sekretario de EEU
Februaro 2018

SOMERA ESPERANTO-STUDADO 2018



Espereble, al la legantoj de *La Ondo de Esperanto* ne necesas prezenti SESon – ja en ĉi tiu gazeto regule aperadas informoj kaj reklamoj pri ĝi (pro kio ni elkore dankas). La Somera Esperanto-Studado havas jam sian 11-jaran historion (ĝi ekestis en la jaro 2007, kiam oni per tia evento omaĝis la centjariĝon de la eldono de la unua lernolibro de Esperanto en la slovakia lingvo).

Ĉi-jare SES okazos en la urbo Liptovský Mikuláš, en belega turisma regiono de

Malaltaj Tatroj. Ankaŭ pro la loko mem SES-2018 promesas esti tre vizitinda – preparataj estas pluraj allogaj ekskursoj al la belega montara naturo, kaj ĉi-jara programo estos eksterordinare riĉa je diversaj allogaj programeroj.

Kiel jam kutime, la ĉefa programo – instruado – okazos antaŭtagmeze (9h00 – 13h00). Preparita estas internacia teamo de spertaj instruistoj, kiuj zorgos pri ĉiuj lingvo-niveletoj de A1 ĝis C2. Facilas do veni eĉ kun siaj pli aŭ malpli lertaj amikoj, konatoj, familianoj – por ĉiu troviĝos ĝusta lingvo-kategorio. Aldone al la tradiciaj lingvokursoj okazos speciala kurso pri Esperanto-literaturo, kio certe allogos atenton de ĉiuj literaturemaj esperantistoj.

Du eŭrop-uniaj projektoj okazos dum SES kun subteno de la programo Erasmus+. En la unua gejunuloj trejniĝos, kiel iĝi bona E-instruisto kaj okazos ankaŭ laborkunsido de la organizantoj de ĉi tiu unujara trejnado, gvidata pere de Ĉeĥa Esperanto-Junularo. Dum la dua projekto okazos la fina sesio de la dujara programo por Esperanto-instruistoj kaj movadanoj sub la gvido de Halina Komar kaj la pollanda organizo CIE (Centro de Internacia Edukado). Ekzamenemaj estas bonvenaj en la KER-ekzamenoj, por testi sian lingvonivelon kaj havi ateston pri ĝi.

Ankaŭ la posttagmeza kaj vespera programoj promesas neforgeseblon: krom pluraj allogaj ekskursoj (legu en la retejo) preparataj estas pluraj vere interesaj, kelkaj eĉ nekutimaj atelieroj, diskutrondoj, prelegoj, danckursoj ktp. Kaj vesperoj? Koncertoj de ekz. Kaŝi el Germanio (kiu konas, scias ke temas pri 100% kvalito kaj energio, kiu ne konas, nepre ĉeestu ian lian koncerton!), duopo de bardoj: Handzlik kaj Bronŝtejn, unika nacia vespero (jes ja, kun vin-gustumado) kun nacia popolmuziko, teatraĵo *Ludoviko*, kinejo, diskejo, internacia kaj kuir-arta vesperoj...

Dum ĉi-jara SES ni povos bonvenigi ankaŭ kelkajn specialajn gastojn, ekzemple, la redaktoron kaj eldonanton de *La Ondo de Esperanto* (mi jam antaŭĝojas), la ĉefredaktoron de la revuo *Esperanto* kune kun la edzino (verkistino kaj Esperanto-instruistino), la nunan eldoniston de *Heroldo de Esperanto* kaj plurajn aliajn.


Eblus daŭrigi, sed ni ŝparu vortojn – la evento certe meritas vian atenton, se vi emas pasigi someron aktive, se vi emas lerni ion novan, esperantumi, movadumi, kulturumi. Tiukaze SES estas por vi la ĝusta aranĝo! Vizitu do ties retejon por legi detalojn kaj aliĝi: <http://ses.ikso.net>

Peter Baláž (Petro)
E@I-kunrodiranto, SES-organizanto

LINGVO ŜANĜIĜAS POR SPEGULI LA SOCION

20-an de oktobro 2016

Pasintan vendredon la Ĝenerala Direkcio pri Tradukado de la Eŭropa Parlamento havis la honoron gastigi neniun alian ol la eminentan lingviston David Crystal: la pintan verkiston kaj preleganton pri la angla lingvo. En plenplena parlamenta salono la profesoro lumigis niajn mensojn per brila prelego kun la titolo 'Kies angla?'



Profesoro David Crystal, kiu estas fama en la tuta mondo kaj verkis pli ol 100 librojn, kunigis larĝan gamon da spertuloj kaj tradukistoj en ĉiuj EU-institucioj kiuj soifis ekscii pli pri la estonteco de unu el la plej parolataj lingvoj de la mondo. "Sed, kiom da homoj fakte parolas la anglan?", demandis la profesoro. "La respondo estas ĉiam la sama: ni ne havas ajnan ideon".

Por prognozi la estontan evoluon de iu lingvo estas esence kompreni ne nur la nuntempon sed ankaŭ la pasintecon, plene konsiderante la kulturan fonon. Kaj ĝuste tial gravegas teni la

okulojn kaj orelojn vaste malfermitaj, por scii kio nun okazantas en Hindio kaj Ĉinio, kie ni rimarkas la plej signifan evoluon de la angla lingvo.

Do, duonŝerco sed firme, profesoro Crystal konfirmis kion ni ĉiuj provis diveni: tute ne eblas taksi kiom da homoj parolas la anglan. Unue, ĉar estas tute neeble vivteni tutmondajn statistikojn; kaj due, ĉar treege malfacilas difini kion ekzakte signifas "angla-parolanto". Des pli difini kio estas unua lingvo, dua lingvo, gepatra lingvo, denaska parolanto, ktp. Kiu nivelo de flueco validu tiurilate?

Laŭ Crystal, ĉu iu flue parolas iun lingvon ankaŭ dependas de la kunteksto. Kiel li ilustris en la prelego, kio pri urba novaĵokriisto kiu konas nur 3 parolturnojn kiuj permesas al li sukcese plenumi sian laboron – ĉu li ne parolas flue? Jes ja.

Ĉiel ajn, sendube veras ke la angla estas tutmonda lingvo: Ĝi havas dominan rolon en kampoj kiel teĥnologio, komerco, industrio, politiko, kulturo kaj ekonomio; ĉirkaŭ 400 milionoj da homoj havas ĝin kiel gepatran lingvon, kaj pliaj 1.5 miliardoj da homoj en la tuta mondo parolas kaj uzas la anglan por komunikado laŭ statistikoj. Sed kio okazas al lingvo kiu iĝas tutmonda?

Kiel profesoro Crystal atentigis, kiam iu lando estas konkerita kaj fremda lingvo altrudita, tiu nacio ekserĉas sian propran identecon. Alivorte, la nova lingvo adoptiĝas kaj adaptiĝas. Jen kiel naskiĝas 'lokalismoj' kaj lingvaj variaĵoj. Do, kvankam ili havas la samajn radikojn, la usona angla ne estas la sama kiel la angla parolata en Sudafriko, Aŭstralio aŭ Hindio. Kiu inter ili estas la 'korekta'? Fascine, ili ĉiuj estas; ni ne povas konsideri eĉ la plej ŝajne evidentan gramatikan eraron kiel tian kiam oni faras ĝin en la tuta nacio. Ĝi ne plu estas eraro: ĝi eniris la ĉiutagan uzon kiel speguliĝo de nacia aŭ loka identeco, kiel rimedo de kultura kompreno. Samkiel faras ni ĉiuj, nia lingvo ankaŭ adaptiĝas al novaj bezonoj. Kiel la laŭdegata preleganto saĝe rimarkis: "La lingvo ŝanĝiĝas por speguli la socion. La nuraj lingvoj kiuj ne ŝanĝiĝas estas la mortintaj."

David Crystal

(originalo: <http://termcoord.eu/2016/10/david-crystal-a-language-changes-to-reflect-society/>)

Tradukis: Sandra Schweder

NIA DILIGENTA KOLEGARO

Kiel ni jam informis en la januara numero, aperis vere escepte grava dokumento por la E-movado, la bografiaro de 200 plej elstaraj esperantistoj en la ĝisnuna 130-jara historio. Redaktis la 320-paĝan libron Halina Gorecka jah Aleksander Korĵenkov. Ĉiu leganto havus certe iujn rimarkojn sed vidante kiun literaturon konsultis la radaktora paro, mi ne povas plendi. Elekti 200 personojn el certe kelkmilo da seriozaj kandidatoj ne estis facila tasko. Studi kaj recenzi la libron estas tre postula tasko, ĉar ja ne temas pri literatura facile legebla libro. Do, mi decidis pristudi biografiojn de tiuj kiuj iel fontis el la sama E-nesto kiel mi, do homoj kiuj esperantistiĝis en Zagrebo aŭ sian plej gravaj E-aktivadon havis lige al Zagrebo. Mi trovis 8 tiajn personojn, kiuj influis grave al la monda E-movado: Ivo Lapenna, Tibor Sekelj, Srĝan Flego, Kreŝimir Barković, Marinko Ĝivoje, Dalibor Brozović, Spomenka Ŝtimec kaj mi mem. Kvin el ili esperantistiĝis en Studenta E-klubo de Zagrebo. Ĉiuj estas laŭ

gepatroj kroatoj krom Tibor Sekelj. La du unuaj estas veraj gigantoj de la Movado. Lapenna estis homo kun enorma energio kaj ambicio kaj Sekelj estis denaska aventurulo kaj grandega scivolemulo. Se ili ambaŭ ne havus problemojn pro la dua mondmilito, verŝajne ili ne restus tutvive fidelaj al la eta homkomunumo kia la esperantista. Ĉiukiaze estas interesa konkludo ke unu malgranda urbo kia Zagrebo (nuntempe 800.000 loĝantoj) naskis 4% de plej gravaj personoj en la E-movado de la mondo. Mi nur bedaŭras ke en tiu grupo ne troviĝas ankaŭ Vida Jerman, fama aktorino kiu dum du jardekoj estis ĉefa teatra kreanto de la Movado kaj Nikola Rašić, kiu dum 15 jaroj gvidis la Universalajn Kongresojn. Sed ili venos al la postaj 200 personoj post 100 jaroj.

Kompreneble ekzistas pli grandaj metropoloj de Esperanto. Unualoke tio estas Parizo kaj dualoke Budapeŝto. Ili ambaŭ gastis dekkvinon da gravaj esperantistoj.

Zlatko Tišljar

GRANDA VENKO DE PLURLINGVISMO



La itala Ŝtata Konsilantaro rifuzis la 100-procente anglalingvajn magistrajn studojn ĉe la Politeknika Instituto de Milano (Istituto Politecnico di Milano). La decido de la itala Konstitucia Kortumo de la 27a de februaro 2017, pri kiu ni jam raportis, ne lasis dubojn pri la decido, kiun devis fari poste la itala Ŝtata Konsilantaro.

La 100%e anglalingvaj studoj, ekde la magistra nivelo, kiun sisteme enkondukis la Politeknika Instituto de Milano kaj kies ekzemplon sekvis certa kvanto da italaj universitatoj, estas do definitive rekonitaj kiel kontraŭlegaj, ĉar ili kontraŭas la Konstitucion, ĉefe ĉar ili forigas la italan lingvon de la altnivelaj studoj ofertataj en la supera edukado. La kvalifikon esti "internaciaj" meritas nur tiaj studoj, kiuj estas donataj en minimume du lingvoj, inter ili evidente la nacia lingvo, kio estas plej baza afero kaj konformas al plej elementa racio. La universitata komerco eduki je nekredible altaj prezoj studentojn kiuj scias nenion pri la lingvo de la gastiganta lando, kaj antaŭ kaj post la studociklo, kaj kiuj sekve estos nedungeblaj en la entreprenoj de tiu lando ĉu en la lando mem ĉu eksterlande, devas do finiĝi.

Se ni komparas tion kun la situacio en Francujo, tiuj praktikoj estas formale malpermesitaj laŭ leĝo pri supera edukado kaj esploro de la 22a de julio 2013, la tiel nomata "leĝo de Fioraso". Tamen la leĝo (artikolo 2 de la leĝo kaj artikolo L121-3 de la kodo pri edukado) estas aplikata mole fare de la ministerio, tiel ke pli ol 800 magistras kursoj instruataj en lernejoj pri mastrumado, pri inĝenierado kaj en universitatoj estas instruataj kvazaŭ kontraŭleĝe, atendante hipotezan malvalidigon fare de la Ŝtata Konsilantaro.

Dum okazos je la venontaj 22a kaj 23a de majo en Parizo interministeria konferenco pri la eŭropa spaco de supera edukado kaj estos festata la dudekjariĝo de la deklaro de la Sorbonne1, la demando meritas esti portata al la publiko. Kiel vere pripensi eŭropan kaj internacian superan edukadon kiu ne estu "ekstertera", sed bone enradikiĝinta en la eŭropaj kulturoj? Jen pli interesa temo por diskuto ol la senproblema adaptiĝo al tiom malbone difinita tutmondiĝo.

La OEP (Observejo pri Plurlingveco)

Vidu ankaŭ

<http://www.ilpost.it/2018/01/31/politecnico-corsi-inglese-ricorso/>

<http://tg24.sky.it/cronaca/2018/01/30/sentenza-corsi-in-inglese-politecnico.html>

KIOM DA EŬROPAJ LINGVOJ ESTAS ENDANĜERIGITAJ?

Ĉirkaŭ 640 lingvoj estas en danĝero malaperi en Eŭropo pro infanoj kiuj ne plu lernas ilin kiel gepatran lingvon hejme, diris deklaris UNESCO en sia lasta raporto. UNESCO difinas gapatran lingvon tiun lingvon kiun infano unue lernas hejme kun siaj gapatroj kaj aliaj pli aĝaj familianoj. La plej multaj el ili estas en Rusio kaj en alia parto de Eŭropo plej multaj en danĝero estas en Italio.

Euronews

VARMA VINTRA SESIO EN POZNANO



Fotoj pri Interlingvistikaj studentoj UAM 2017-2020 (nur por studentoj)

Kiel kutime, komence de la jaro (inter la 3 kaj 10a de februaro) okazis la vintra sesio de la Interlingvistikaj Studoj en UAM, Poznano. Alvenis 14 gestudentoj el 10 landoj (Ĉinio, Koreio, Brazilo, Usono, Turkio, Rusio, Francio, Hispanio, Germanio kaj Pollando). Post la konsultiĝo kaj ekzamenoj, lunde komenciĝis la kursoj de

la dua semestro: Michael Farris prezentis la ĝeneralajn regulojn de morfologio kaj sintakso eluzante la sciojn de la diverslingva partoprenantaro. Lidia Ligęza kaj Tomasz Chmielik enkondukis la studentojn en la duan periodon de esperanta linteraturo.

La multkultura konsisto de la grupo donis fekundan bazon al Ilona Koutny trakti diversajn flankojn de komunikado (la studentoj praktike povis kompari la diversajn korpolingvaĵojn). Ŝi gvidis kurson ankaŭ pri esperanta gramatiko, kie la interesiĝemaj studentoj povis ekkoni kaj diskuti la problemojn de esperanta morfologio, inkludanta radikkarakteron.

La varma etoso montriĝis ankaŭ dum la komuna vespero: pluraj partoprenantoj prezentis poemojn, kantojn. Krom ili ankaŭ loka esperantistino Suzana Kornicka kantis kaj gitarludis. La sesion sekvis sabata ekskurso al Toruno, kie post urborigardado kaj vizito de Studio P. en la Junulara Kulturdomo, Maria Pokrzywnicka prezentis en la Etnografia Muzeo la ĉiutagan vivon el la epoko de Zamenhof (<http://etnomuzeum.pl/eo/pri-ni/>). Poste ŝi gastigis la gestudentojn per mielkuko kaj ludigis ilin kadre de la interkultura karnavala renkontiĝo.

Ilona Koutny, gvidanto de la Studoj

PRINTEMPAS EN GRESILLON

Se vi deziras fari grandan progreson en via studo de la lingvo por povi konversacii kun la alilandanoj kiuj ĉeestos la staĝon, tiam pensu aliĝi al PRINTEMPAS ĝis tiu ĉi semajnfino por profiti la reduktion. <http://gresillon.org/printempas>



Jannick Huet-Schumann

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 28-an de februaro 2018

Redaktoro: Zlatko Tišljar

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, Sandra Schweder, David Crystal, Peter Baláž, OEP, Euronews, Ilona Koutny, Jannick Huet-Schumann

Kontakto: ztislar (ĉe) gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

